


# Meze en Eŭropo

*Bulteno de Sar-Lor-Luks-Unio*

ISSN 1619 - 8344

n-ro 1 \* unua jaro \* junio 2002



En tiu ĉi numero:

**Eurokola-en-Esperanto 2002**

**La 51a staĝo de Esperanto France-Est \* Nova estraro de U.F.E.**

**Nun aperas: la nova eldono de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**

Nia titola bildo: Ed Borsboom prelegas pri Raymond Schwartz (vidu paĝon 10) © Peter Hauser

## Estimataj gesamideoj,

Kun granda ĝojo mi povas hodiaŭ prezenti al Vi la unuan numeron de la nova bulteno de la Sar-Lor-Luks-Unio.

Ĝia nomo „Meze en Eŭropo“ indikas al Vi, ke la bulteno aperas en la mezo de Eŭropo kaj celas servi kiel platformo por la informado kaj komunikado de la diversaj Esperanto-organizaĵoj en la koro de Eŭropo.

Por esti ĉi tie plej rapide kaj malmultekoste havebla, ni uzas la interreton kiel transportilon. Pro tio mi tre kore invitas ĉiujn klubojn, kiuj deziras partopreni, sendi retmesaĝon kiel eble plej baldaŭ al la redakcio por kompletigi la informliston.



Ĉiuj membroj de la listo poste ricevos retmesaĝon okaze de la apero de nova numero. Mi esperas ke la redakcio ankaŭ estonte ricevos multajn interesajn kontribuojn de Vi por la sekvaj numeroj de la bulteno kaj mi tre kore dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis al tiu ĉi numero kaj al ĉiuj, kiuj pretas kunlabori ankaŭ por la sekvontaj.

Do, mi deziras al Vi ĉiuj plenajn ĝojon dum la legado de nia nova bulteno kaj al la redakcio sukceson en la laboro por „Meze en Eŭropo“.

Via

*Oliver Walz*

prezidanto de la Sar-Lor-Luks-Unio

\*\*\*\*\*

## Estimataj gelegantoj,

Jen okazo, por mi kiel redaktoro mallonge prezenti min:

Mi estas Peter Hauser, preskaŭ kvardekjara hardisto kaj maŝiningeniero. Esperanton mi komencis lerni en la jaro 1985 en la ercmontara urbeto Schwarzenberg (nun en la federacia lando Saksio de FRG). La proksima landlimo al la tiama ĈSSR kaj la bonaj rilatoj kun la klubo en Karlovy Vary ebligis viglan kaj impresigan esperantan vivon. En 1975 iniciatis Jaroslav Klement (†), la tiama prezidanto de tiu klubo, Amikecajn Renkontiĝojn, el kiuj sekve fariĝis la tradiciaj Internaciaj Turismaj Renkontiĝoj de Esperantistoj en Ercmontaro (ITREE) kun kelkdeko da partoprenantoj el pluraj socialismaj landoj.

La bulteno, kiun Vi vidas sur la ekrano aŭ kiun Vi tenas en Via mano, okupiĝas neeviteble pri la aspektoj de lingva politiko en Eŭropo. Ankaŭ neeviteble ĝi klopodas kontribui al same vigla kaj interesa esperanta etoso, kiel ĉi tie la paciencaj ĉeĥaj geamikoj, kiuj dum la unuaj jaroj tiel multe helpis lingve progresi.

Pro teknikaj problemoj la apero de la unua numero bedaŭinde tre longe prokrastis. Tial necesas ŝovi nun grandparton de la aktuale publikenda materialo al la sekvaj numeroj. Nek eblas promesi nek plani dumonatan aperritmon. Malpli granda amplekso kaj denseca kvalito estas necesa, por ke la deprenado de la interreto ne daŭru tro longe. Se Vi bezonas version en preskvalito de foto-nivelo, bonvolu kontakti la redaktoron. Rekomendindas uzi por la legado ĉi tie ekrano la version 5.0 de la programo „Acrobat Reader“ aŭ pli novan.



Mi kore dankas al Edmond Ludwig, Pol Denis, Armand Hubert, Gilbert Stambach kaj Edgar Müller, kiuj pretas helpi per tradukoj, konsiloj kaj rekomendoj rilate al la franca lingvo, kiun mi ne regas.

Same mi kore dankas al Henri Masson, Germain Pirlot, Xavier Dewidehem, László Szilvási kaj al la oficistoj de la Ĵurnalista kaj Informa Oficejo de la Federacia Registraro de Germanio por la afabla disponigo de materialoj.

Via

*Peter Hauser*

## Enhavtabelo

			
La tradicia Amikeca Renkontiĝo en Metz	4		
Euroscola 2002	5	(4)	(4)
Raporto pri la dua Euroscola-tago 2002	6		
Gratulon al Prof. Dr. Max Mangold	7		
Letero de Jaques Chirac al Vincent Charlot	8	(8)	(8)
Salutvorto de la prezidento de FRG (1987)	(9)	(9)	9
Pentekosto: Kongresoj kaj nova estraro de U.F.E.	10		
La 5a staĝo de Esperanto France-Est	10	(11)	(10)
Nun aperas: La nova eldono de PIV	12	12	12
Resumo de Xavier Dewidehem pri Euroscola	13		
Pres-indikaĵoj	14	14	14

Paĝnumeroj en krampoj: resumoj

### *Programo de Sarlanda Esperanto-Ligo por la dua duonjaro 2002-*

### *Programm des Saarländischen Esperanto-Bundes für das zweite Halbjahr 2002*

**06.09. Monata kunveno / Monatstreffen**  
19.30 h  
Restaurant „Hauck: Das Weinhaus“  
St.-Johanner-Markt 7, 66111 Saarbrücken  
Tel.: 0681 - 31919

**06.12. ĝis / bis 08.12.2002**

**56a Kultura Semajnfino de  
Sarlanda Esperanto-Ligo  
56. Fortbildungstagung  
des Saarländ. Esperanto-Bundes e.V.**

**04.10. Monata kunveno / Monatstreffen**  
19.30 h  
Steakhaus  
Bahnhofstraße 16, 66450 Bexbach  
Tel.: 06826 - 4546

**Kardinal-Wendel-Haus  
66424 Homburg / Saar  
Tel.: 0 68 41 - 41 81  
Ĉefprelegantino:  
Dr. phil. Pierrette Müller**

**22.11.2002**

**21.12.2002**

**Jarĉefkunveno / Jahreshauptvers.  
ansermanĝado / Martinsgansessen**  
19.00 h  
Antaŭmendoj ĝis la 20.11.2002 ĉe SEL  
Vorbestellungen bis 20.11.2002 beim SEB  
Gasthaus “Park”  
Bahnhofstr. 3, 66440 Blieskastel  
Tel.: 0 68 42 - 93 08 55

**Zamenhof-Festo (bankedo)**

**19.00 h**  
Antaŭmendoj ĉe SEL, Vorbest. beim SEB  
Restaurant “Kloster Hornbach”  
Im Klosterbezirk, 66500 Hornbach  
Telefon: 0 63 38 - 9 10 10 0  
www.kloster-hornbach.de



# Tradicia Amikeca Renkontiĝo en Metz

Je la 3a de majo 2002 okazis la Amikeca Renkontiĝo de la Esperantistoj de Metz (orienta Francio) kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo.

Tiuj bonaj rilatoj en nia trilanda angulo, retrorigardos en 2003 al 25-jara historio.

Per la fondo de la Sar-Lor-Luks-Unio en la jaro 1998 en Saarbrücken ili ricevis kvazaŭ institucian esprimon.



Oliver Walz (la nuna).

Madeleine de Zilah prezentis la nove aperintan libron "Tarokoj kaj Epokoj" de Christian Declerck (eldonisto: Flandra Esperanto-Ligo).

Bone, ke dum la renkontiĝo povis ĝui viglan esperantan etoson ankaŭ la konata ĵurnalisto JOACHIM MESSNER de la Sarlanda sekcio de ARD (unua germana ŝtata televido), kiu filmis kaj intervjuis partoprenantojn.

Li venis poste al Zweibrücken por intervui la edzperantitan familion Walz kaj por ekscii iom pli pri la 11-parta televidserio kun Sandra kaj Edgar Müller.

Pri la renkontiĝo raportis Edgar Müller.

La renkontiĝo okazis ĉiujare en la luksa restoracio « L'Aloyau », ĉar la kutima, komforta renkontejo « La Popote » montriĝis tro malgranda por la multnombraj partoprenantoj. Ilin salutante alparolis Bruno Masala (la unua Sar-Lor-Luks-prezidanto) kaj

\*\*\*\*\*



## Euroscola



ist eine Veranstaltung des Europäischen Parlamentes.

Dabei sollen Jugendliche (in der Regel ganze Schulklassen) „spielend“ parlamentarische Arbeit kennenlernen, in den Kommissionen internationale Zusammenarbeit erleben und dadurch zur intensiveren Beschäftigung mit Fremdsprachen animiert werden.

Mehrmals nahmen bisher internationale Gruppen von Esperantisten teil, unter denen oft auch Jugendliche aus den osteuropäischen Beitrittsländern waren.

Die Artikel beschreiben den Ablauf eines solchen Tages im Europäischen Parlament und geben Eindrücke eines beteiligten französischen Jugendlichen wieder.

est une manifestation organisée par le Parlement Européen. Des jeunes (en général des classes entières) y participent pour s'initier de manière ludique au travail des parlementaires, pour découvrir dans les commissions la collaboration internationale et y être encouragés à pratiquer de manière plus intensive les langues étrangères.

Plusieurs fois déjà des groupes internationaux d'espérantophones y ont participé, parmi lesquels se trouvaient également des jeunes originaires des pays d'Europe de l'est candidats à l'adhésion à l'Union Européenne.

Les articles décrivent le déroulement d'une telle journée au Parlement Européen et rendent compte des impressions d'un jeune participant français.

(trad. Edmond Ludwig)

# *Euroscola-en-Esperanto*

estas certe inter la plej gravaj aranĝoj, kiujn esperantistoj sukcesis organizi ĝis nun. Tamen ĝi ne ludas la rolon en la konscio de multaj gesamideanoj, kiun ĝi meritus. Tion jam montras la fakto, ke neniam partoprenis germanaj junuloj.

Euroscola estas aranĝo de la Eŭropa Parlamento, por instigi gimnasiajn lernantojn el eŭropuniaj kaj kandidataj landoj interesiĝi pri la funkciado de parlamento kiel baza elemento de demokratio, kaj por stimuli ilin okupiĝi per fremdaj lingvoj. Sendube tio estas tre alta pretendo.

Memkompreneble Euroscola ne estas forumo plenkore pledanta por Esperanto pro la ĉeesto de esperantistoj.

Kvazaŭ mesiista konduto vekus neutilan kontraŭstaron kaj lingvopolitike brilan argumentadon ne eblas supozi en la aĝo de la agantaj lernantoj. Tial necesas realisme rigardi

la aferon, se dezirindaj reagoj en flua diskuto ne estas tute trafaj aŭ foje eĉ forestas. Multe pli valoras, affronti neesperantistajn junulojn per funkcia Esperantlingva komunikado kaj etoso enkadre de iu por ili persone tre impresiga aranĝo.

Por lerte eluzi tiun okazon dezirindas pli bona Esperantlingva nivelo de la partoprenantaj lernantoj, kiel Xavier DEWIDHEM, kiu estas unu el la francaj organizantoj, klarigas.

Tiurilate la preparo de Euroscola 2003 devas komenci nun ĉie, kie eblas aranĝi kursojn por lernantoj. La sukcesa kvalifikado por partopreni Euroscola-en-Esperanto devas esti forta instigo same por la lernantoj kaj la kursgvidantoj.

La rakonton pri la ĉiujare dua aranĝo de Xavier DEWIDHEM vi povas legi komplete en tiu ĉi numero. Koran dankon al li pro la afabla disponigo de la materialo.

\*\*\*\*\*

## *Enkonduko kaj raporto pri la preparoj dum la antaŭa vespero*

Merkredon la 17an de aprilo okazis la dua Euroscola-tago de tiu ĉi jaro, en kiu partoprenis Esperanto-delegacio. Tiu ĉi dua delegacio konsistis el junaj Esperanto-lernantoj el Belgio, Italio, Pollando kaj Slovenio.

Mi raportas pri la tago, ties preparo kaj disvolviĝo (-> paĝo 6), aldonante fine pozitivajn kaj negativajn aspektojn kaj rekomendojn por eventuale venonta Euroscola-en-Esperanto (-> paĝo 13).

Ni unue rememorigu, ke dum la tuta tago ne ĉiuj eŭropuniaj oficialaj lingvoj ĉeestas.

Efektive, oni povas paroli ĝenerale nur en kvin lingvoj, nome la angla, la franca, la germana, la itala kaj la hispana; plue, nur en du lingvojn estas tradukataj ĉiuj paroladoj, nome en la anglan kaj en la francan.

Tiel funkcias ĉiuj ordinara Euroscola-tagoj.

La grupoj alvenis Strasburgon je lundo, la 15an de aprilo.

Kun Kristian GARINO, kiu partoprenis la martan Euroscola-tagon kaj kiu estis kunhelpanta la preparon de la aprila, la grupanoj prilaboris la temojn de Euroscola.

En la vespero okazis kunsido, en kiu ni atentigis la partoprenantojn pri pluraj detaloj koncerne la disvolviĝon de la tago, kaj prilaboris nian matenan memprezenton (elekto de ĉefrepresentanto, paroladon).

Sed ni ankaŭ insistis pri la graveco de aktiva partopreno dum la tago, precipe per pri-demandoj en la mateno, interdiskutoj en la komisionoj kaj debataj intervenoj en la posttagmezo (emfazante pri la eŭropunia lingva situacio, la egalrajteco de ĉiu lingvo, ktp).

-> daŭrigo sur paĝo 6

# Raporto pri la aranĝoj dum la Euroscola-tago

1- Sidis en la ĉefdebatejo la "junaj parlamentanoj" (JP), la akompanantaj adoltoj (AA) de ĉiuj delegacioj, plie la kromaj junuloj (KJ) de la Esperanto-delegacio.

2- Komence de la mateno, ĉiuj delegacio laŭvice sin prezentis al la asembleo (franclingve, sed precipe anglalingve).

La Esperanto-delegacion prezentis juna italo en la itala lingvo: li prezentis ne nur sian lernejon, sed trafe la tutan, tuteŭropan delegacion.

Li prezentis la lingvon Esperanto kaj imagis ĝin kiel eblan solvon por atingi la idealon de Eŭropa Unio (unueco en diverseco).

Akompanis lin po unu junulo el ĉiuj Esperanto-grupo, kiuj fine (laŭvice) elkore salutis la asembleon kaj en Esperanto kaj en sia nacia lingvo. Sed kiam la flandra belgo parolis flandringve... mirige kaj mirinde, tiam aplaŭdegis la asembleo, precipe la nacia belga delegacio (kiu konsistis el flandroj). Mirige, ĉar neniam ĝis nun ni konstatis tian elmontritan entuziasmiĝon. Vere nia memprezento estis tre taŭga kaj celtrafa. Ĝi eĉ ja estis la plej elstara inter la diversaj tiutagaj memprezentoj.

3- Post opiniesploro ne tre interesa por ni, la JP'j havis la okazon pridemandi la kvar parlamentajn oficistojn, kiuj ĉeestis en la prezidanta tribunolo. Tiam estis kelkaj demandoj pri la lingvoj.

a) La unuan demandon vortigis itala esperantisto. La demando estis simile jena: "Baldaŭ estos en Eŭropa Unio 20 lingvoj... Ĉu vi intencas aŭ jam planis adopton de unika lingvo, Esperanto?" La respondo de la oficisto estis plej faciligita (konservo de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj, ktp)...

b) Alia junulo (esperantisto) demandis pri postuloj de pluraj oficejoj dungi nur homojn, kies gepatra lingvo estas la angla. Oficisto plene neis la ideon, laŭ kiu ekzistus tiukaze lingva diskriminacio: "la societoj simple dungas, kiujn ili bezonas laŭ la cirkonstancoj".

[red:  
la koncernan oficialan proteston de UEA ĉe EU  
ni povos publikigi nur en la venonta numero]

c) Fine, italo ne-esperantisto deziris reagi al la unua respondo de la oficisto (3.a), dirante, ke same kiel nun Eŭropa Unio, ankaŭ Italio (kiu estas ducent-jara) kalkulis multajn lingvojn kaj kulturojn; sed \*dank' al la lingva unueco\* (enlanda komuna lingvo) sukcesis la unueco de la itala nacio, kial ni ne konsideru tiun ekzemplon por la venonta Eŭropa Unio.

4- Post la tagmanĝo, dum kiu ili ludis «Eurogame», la JP'j sin arigis en la kvin komisionojn.

La itala esperantisto Francesco fariĝis la sekretario de la unua komisiono (Homaj rajtoj, demokratio), kaj nia itala, matena reprezentanto fariĝis la prezidanto de la tria komisiono (Loko de Eŭropo en la mondo).



5- Post la enkomisiona laboro, ĉiuj residis en la ĉefdebatejo por raporti \*kaj debati\* pri ĉiuj komisiona rezolucio. Jen rimarkoj pri la raportoj de ĉiuj komisionoj (krom la dua):

a) Komisiono unua:

**Homaj rajtoj kaj demokratio.**

Oni raportis kompreneble pri diskriminacioj, sed ne pri la lingva situacio / diskriminacio en Eŭropa Unio...

Bedaŭrinde, neniu kaptis la okazon mencii tiun problemon...

b) Komisiono tria:

**La loko de Eŭropo en la mondo.**

Fakte, tiu temo celas precipe tutmondigon, rilaton al la Tria Mondo...

Okaze de la debato, itala esperantisto pridemandis la komisionan estraron pri la loko

de pontlingvo en Eŭropa Unio (tiam la parlamenta oficisto rimarkigis la netaŭgecon de tiu demando kadre de tiu ĉi temo): la prezidanto (esperantisto) respondis favore al akcepto de Esperanto kadre de konservo kaj protekto de la aliaj lingvoj kaj kulturoj.

c) Komisiono kvara:

#### **Junularo.**

Ĝi pripromonis plurajn aferojn rilatajn al kaj interesajn por junularo, nome studojn, tra-eŭropajn vojaĝojn, instruadon pri la eŭropuniaj institucioj k.s...

Sed tiu sama komisiono fine de sia rezolucio deklaris, ke "la angla devus esti instruata tra la tuta Eŭropo, tiel ke ĝi fariĝu la komuna lingvo por ĉiuj eŭropanoj" !!...

Nenia reago (malgraŭ ties nepreco) de ia esperantisto... Ni tamen memoru, ke en tiu rezolucio la prilingva punkto estis ero inter pluraj aliaj eroj, interesaj kaj entuziasmigaj por la junuloj kaj ke la parlamenta oficisto mem antaŭe rimarkigis, ke tiu asembleo ne estas reprezenta por la vera, tuta eŭropunia junularo...

d) Komisiono kvina:

#### **La estonteco de Eŭropo.**

La komisiono proponis kelkajn reformerojn.

Ĝi i.a. menciis, ke en baldaŭa konteksto de 25 lingvoj en Eŭropa Unio, ni bezonos unu

komunan lingvon, "ĉu Esperanto, ĉu la angla" ! En la debato, iu reagis malfavore al tiu ideo de komuna lingvo (necese konservi la riĉecon de niaj tradicioj), sed la komisiona sekretario (ne-esperantisto) juĝis, ke la principo de komuna lingvo ja estos oportuna por la eŭropuniaj institucioj.

6- Tiel finiĝis la Euroscola-tago.

Vespere venis en la gastejon CREPS ĵurnalisto de la alzata ĉiutaga ĵurnalo DNA por intervjui kelkajn junajn partoprenintojn kaj adoltojn.

7- Notinde, ke komence de la mateno s-ro Fritz (direktoro de la strasburga parlamentejo) mem petis al Kristian Garino, ke ni ĉiutage ne "varbadi", prilaudu Esperanton, agu kiel "propagandistoj"

(li petis franclingve: "nenian mesiadon !").

Kaj kiam fine de la tago Flory Witdoeck (belga responsulino) danke donacis al s-ro Fritz dolĉaĵojn, li respondis esti (tre) tolerema pri (kaj malfermita al) partopreno de Esperanto-delegacio, sed ke ni atentu nian sintenon kaj prezenton de Esperanto (i.a. rilate la interpretistojn).

-> daŭrigo sur paĝo 13

\*\*\*\*\*

*Ni gratulas postfeste al*

*Prof. Dr. Max Mangold*

*okaze de la 80-a naskiĝdatreveno !*

Profesoro d-ro Max Mangold, esperantisto de sia 15a jaro, festis je la 08an de majo 2002 sian 80-an naskiĝdatrevenon.

Li havis dum preskaŭ tridek jaroj la katedron pri fonetiko kaj fonologio de la Universitato de Sarlando en Saarbrücken.

Kune kun Günther Becker kaj Oliver Walz li produktis ĝis la malfunkciigo de la Publika Kanalo Saarbrücken ĉiutage en marto entute 130 radioelsendojn pri didaktiko de la lingvo-lernado.



Elstarajn meritojn li akiris pro la ellaboro de skriboj por afrikaj lingvoj, kiuj antaŭe nur estis parolaj.

*Ni kore gratulas kaj deziras ĉion bonan !*

# Letero de Jaques Chirac

La 15-an de aprilo 2002 Jacques Chirac [ĵak ŝirak], do antaŭ la reelekto por la posteno de la Prezidento de Francio, skribis jenon al samideano Vincent Charlot, la reprezentanto de UEA ĉe UNESCO:

*Kara sinjoro,*

*Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.*

*Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto kiu direktis ĝiankreiĝon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.*

*Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.*



**Le 15 avril 2002 (donc avant sa réélection à la Présidence de la République) Monsieur Jacques CHIRAC a fait parvenir une lettre encourageante à Vincent CHARLOT, délégué de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) auprès de l'UNESCO. Il y proposait - en cas de réélection - de soumettre au nouveau gouvernement et en particulier au futur Ministre de l'Education Nationale, la possibilité d'inclure l'espéranto dans les matières à option du baccalauréat.**

**(trad. : Edmond Ludwig)**



**Am 15. April 2002 (also vor seiner Wiederwahl zum Präsidenten der Französischen Republik) schrieb Herr Jaques CHIRAC einen wohlwollend gefaßten Brief an Vincent CHARLOT, den Vertreter der Esperantoweltorganisation (UEA) bei der UNESCO.**

**Darin stellte er für den Fall seiner Wiederwahl die Überprüfung der Möglichkeiten, Esperanto als fakultative Sprachprüfung in der Abiturstufe einzuführen, durch den Nationalen Bildungsminister in Aussicht.**

*Estas tute sendube ke, se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la Ministro de la Nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkludado kiel elektebla lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj esprimitaj fare de la gelernantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.*

*Mi petas vin kredi, kara sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.*

*Plej kore. [manskribite]*

*Jacques Chirac*

---

fonto: ret-info  
<http://www.eventoj.hu>



Jaques Chirac (dekstre) kun Gerhard Schröder, dum 78a franca-germana konsultiĝo 23.11.2001 en Nantes  
© Bundesbildstelle, Berlin, Julia Fassbender



En tiu kunteksto estas interesa la salutvorto de la tiama Prezidento de la Federacia Respubliko de Germanio, s-ro Richard von WEIZSÄCKER, okaze de 100-jara jubileo de Esperanto:

## *„Ihre Idee hat Lebenskraft bewiesen“*


*Es ist von vielen anerkannt, daß eine von allen Menschen beherrschte Internationale Sprache der besseren Verständigung der Völker und dem Weltfrieden dienen würde. Esperanto wäre auch in der Lage, die Rolle einer solchen Internationalen Sprache zu übernehmen. Dennoch ist Esperanto noch weit davon entfernt, eine allgemein akzeptierte Internationale Sprache zu werden.*

*Die Esperanto-Bewegung hat in den letzten 100 Jahren ihres Bestehens gleichwohl nicht aufgehört, an der Verbreitung des Esperanto zu arbeiten. Sie hat damit Erfolg gehabt.*

*Die Zeiten, da man Esperantisten für eine kleine Gruppe weltfremder Sprachidealisten hielt, sind vorbei. Mehr und mehr werden Ihre Argumente ernsthaft erwogen. Hohe Vertreter nationaler Regierungen und internationaler Organisationen zeigen Ihnen öffentlich ihr Interesse und ihre Sympathie. Rundfunkstationen senden in Esperanto. Der Kreis der Länder, in denen Esperanto gelehrt und gelernt wird, dehnt sich aus. Ihre Idee hat Lebenskraft bewiesen.*

*Je mehr es solche positiven Zeichen gibt, desto realistischer wird die Hoffnung, daß Sie an irgendeiner Stelle der Welt die Mauer der Widerstände durchbrechen. Bis dahin werden Sie, wie bisher auf sich allein gestellt, daran arbeiten müssen, daß Ihre Sprache sich immer mehr verbreitet.*

*Ich begrüße es, daß vermehrt Beiträge aus der deutschen Kultur die Esperanto-Literatur bereichern. Hiermit erweist sich, daß Vielfalt der Kulturen und Einheit in der Sprache keine Gegensätze sein müssen.*



Richard von Weizsäcker



Foto: © Bundesbildstelle, Berlin, Engelbert Reineke

Text aus „Esperanto – ein Jahrhundertwerk“ (DEB, 2. Ausg. 1988)



La tiama federacia prezidento, D-ro Richard von Weizsäcker, laŭdas en la jaro 1987 okaze de la centjara jubileo de nia neŭtrala mondlingvo Esperanton kaj la esperantan movadon kiel kontribuo al la kultura multeco en lingva unueco.

Li plikuraĝigas nin, labori por la plivastigo de la mondlingvo, kvankam ni ne spertis kaj ne spertos subtenon de ekster la movado, ĝis la muro de la kontraŭstaroj estos ie en la mondo trarompita. (resumis Edgar Müller)



En 1987, à l'occasion du centenaire de la langue mondiale, le Président de cette époque de la République Fédérale, le Docteur Richard von Weizsäcker, fait l'éloge de l'Espéranto et du mouvement espérantiste, lesquels contribuent au pluralisme culturel par le biais d'une langue unifiée.

Il nous encourage à travailler à la propagation de la langue mondiale, malgré une absence de soutien dans le passé, absence qui perdurera jusqu'à ce que, quelque part dans le monde, soit ébranlé le mur des oppositions. (trad. Pol Denis)

## Kongresoj kaj la nova estraro de U.F.E.

Dum pentekosto okazis la kongresoj de U.F.E. (en Strasburgo) kaj de GEA (en Husum, federacia lando Ŝlesvig-Holŝtejnio).

La redaktoro de tiu ĉi bulteno partoprenis la GEA-kongreson, kiu krom la jarĉ ef-kunvenon entenis ankaŭ la kunsidojn de fakaj asocioj de GEA kaj cetere brilis pro bona organizado, tre interesa kultura programo kaj pro la pitoreska nordmara naturo.

- \* Prezidanto : **Claude Longue-Epée**
- \* Vicprezidanto pri rilatoj kun la gazetaro : **Bruno Flochon**
- \* Vicprezidantino pri kulturo : **Claude Nourmont**
- \* Ĝenerala sekretario : **Olivier Moreau**
- \* Kasisto : **Jean-Louis Texier**
- \* Estrarano - informado kaj rilatoj kun la federacioj : **Xavier Godivier**
- \* Estrarano - rilatoj kun la sidejo : **Jérôme Mathieu**

Pli detalajn rakontojn vi legos kaj abundon da bildoj vi vidos en la sekva numero, por ke la francaj geamikoj havu intertempe la eblecon, siaflanke skribi raportojn kaj sendi altkvalitajn fotojn.

Kontraste al GEA elektis U.F.E. ĉiujare novan estraron. Plenkore ni gratulas al ties anoj kaj deziras al ni ĉiuj, ke ilia oficperiodo estu tre frukto plena.

\*\*\*\*\*

## La 51a staĝo de Espéranto France-Est

apartenas kune kun la Kulturaj Semajnfinoj de Sarlanda Esperanto-Ligo, okazantaj decembre en Homburg (Saar), al la kleriga koncepto de la Sar-Lor-Luks-Unio.

Kontraste al la plimulto de la samspecaj aranĝoj ili estas ĉiujare organizataj de alia loka grupo de orienta Francio. Tial ili logas ĉi iam per alia pejzaĝo kaj ankaŭ ĉi iam per alia aranĝa koncepto.

La ĉiujara staĝo okazis komune kun la kongreso de la SAT-amikaro dum pasko en Vigy, proksime de Metz, la naskiĝurbo de Raymond Schwartz (1894 - 1973).

Nature estis la fama origine esperantlingva aŭtoro kaj kabaretisto kaj lia verko la ĉi eftemo de la staĝo. Ed Borsboom (Nederlando) gvidis la seminarion pri Raymond Schwartz.



Die jährlich zu Ostern von Espéranto France-Est organisierten Seminare gehören, wie die vom Saarländischen Esperanto-Bund Anfang Dezember, zum Weiterbildungskonzept der Saar-Lor-Lux-Union. Das diesjährige (51.) fand in der Nähe von Metz, der Geburtsstadt von Raymond Schwartz, statt.

Raymond SCHWARTZ (1894-1973) ist einer der hervorragendsten Satiriker unter den Esperanto -Autoren. Als Meister des Wortspiels gründete er 1920 sein erstes Kabarett in Paris, zugleich das erste in der internationalen Sprache Esperanto und lange das einzige mit regelmäßigen Aufführungen.

Sein Roman, Kiel akvo de l'rivero, ein Bestseller, der zur Zeit des Ersten Weltkrieges in Lothringen spielt, wurde ein Klassiker der originalen Esperantoli teratur.

Er und sein Werk standen deshalb naturgemäß im Mittelpunkt des Seminars. (Edmond Ludwig).



Les séminaires annuels organisés aux environs de Pâques par Espéranto France -Est, ainsi que ceux de la Ligue Sarroise d'Espéranto en décembre, font partie du programme de formation continue de l'Union Sarre-Lor-Lux. Cette année ce stage (le 51e) s'est déroulé près de Metz, la ville natale de Raymond SCHWARTZ (1884-1973), qui est l'un des plus

éminents maîtres de la satire et du jeu de mots parmi les écrivains espérantophones. Il anima son premier cabaret parisien en 1920 qui fut le premier en langue internationale et resta longtemps le seul à proposer régulièrement des représentations.

Son roman Kiel akvo de l'rivero, un bestseller, dont l'action se passe en Lorraine dans la période de la Première Guerre Mondiale, devint un classique de la littérature originale en espéranto.

L'homme et son oeuvre étaient par conséquent au centre des discussions du séminaire. (Edmond Ludwig)

### Pri la kabaretoj de Raymond Schwartz

La tre interesa seminaria materialo, kiun ricevis la partoprenantoj, entenas raporton de Gilbert René LEDON.

En ĝi li priskribas ankaŭ la kabaretojn de Raymond Schwartz, la majstro de la vortludo.

La entute unua esperantlingva kabareto "La Verda Kato" funkciis de 1920 ĝis 1926.

De 1932 ĝis 1939 ekzistis "La Bolanta Kaldrono".

Dum lia pariza vivado 1952 / 53 s-ano Ledon mem vizitis ĉi iumerkrede "La Tri Koboldoj"n, kiuj prezentis sin de 1949 ĝis 1956.

Aldonendas, ke en la kabaretoj de Schwartz oni tute ne "krokodilis", kio, kiel ni ĉiuj scias, bedaŭrinde malfacilas hodiaŭ al multaj gesamideanoj eĉ en la monataj klubvesperoj.

\*\*\*\*\*

La vespera programo entenis specialan dolĉaĵon, ĉar Robert Kueny deklamis la prozaĵon "Sub la Regno de Muktuk I-a".

Dum sekva tago okazis komitat-kunsido de Espéranto France-Est, dum kiu reprezentantoj de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL), de Luksemburgia Esperanto-Asocio kaj de BAVELO (la federaci-landa organizaĵo de GEA, kun kiu Espéranto France-Est havas tre bonajn translimajn rilatojn) parolis pri la ĉi jaraj planoj.

Finon trovis la ĉi jara Staĝo dum ekzkurso al Metz, kiun gvidis Catherine Gallego, la prezidantino de Espéranto France-Est.

La partoprenantoj de la Staĝo adiaŭis, dume la kongreso de la SAT-amikaro daŭris ankoraŭ pliajn tagojn.

Pri la jubilea 50a Staĝo 2001 en Storckensohn, kiu substrekis per bukedo da elstaraj fakaj prelegoj la konstatojn de s-ro D-ro Richard von Weizsäcker (-> paĝo 9) antaŭ 15 jaroj, ni raportos en unu el la sekvaj numeroj.



Catherine Gallego ĉi ĉi eronante dum la ekzkurso

### Akrostiko "Bernardo"

Benata estu tiu dom´  
 En kiun venis eta hom´!  
 Radie brilu super ĝi  
 Nedifektebla harmoni´!  
 Al la gepatroj de l´bubeto  
 Respekte iras mia peto:  
 Donacu al Bernardo fratojn  
 Obstine ĉi iujn dek monatojn !

Raymond Schwartz, 27an de majo 1953

Kiam Bernard, la unua filo de lia amiko s-ro Daniel Luez, aĝis kvin tagojn, Raymond Schwartz verkis tiun akrostikon.

*Finfine aperas:*

## *La nova eldono de Plena Ilustrita Vortaro*



La Nova "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV), formato: 150 x 255 mm, 1265 paĝoj, referenca vortaro de Esperanto

en la tuta mondo, kies unua eldono aperis en 1971, estas finfine presita kaj liverita. Temas pri funde reviziita kaj aktualigita eldono, kies ilustraĵoj estas lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigita en la teksto mem.

La oficiala prezento de la verko okazos kun ĉeesto de ĝia ĉefredaktoro, Michel Duc-Goninaz, dum la SAT-kongreso de la 1-an ĝis la 7-an de julio en Alicanto (Hispanio).

Prezo, 70 euroj + registrita afranko.

ISBN 2.9502432.5.8

Pro la kongreso kaj libertempoj, la plenumo de la mendoj kaj antaŭmendoj povos okazi nur post la libertempoj. Pliaj informoj estas riceveblaj de : SAT, 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio.

<[satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)>

<<http://www.sat-esperanto.org/>>

Le "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV, Dictionnaire complet illustré d'espéranto), dictionnaire de référence de



l'espéranto dans le monde entier, dont la première édition est parue en 1971, est enfin imprimé et livré. Il s'agit d'une édition entièrement révisée et actualisée dont les illustrations sont placées non point à la fin de l'ouvrage, mais incorporées dans le texte.

L'inauguration de l'ouvrage aura lieu avec la participation de son rédacteur en chef, Michel Duc-Goninaz, à l'occasion du congrès de l'Association Mondiale Anationale (SAT) qui se tiendra du 1er au 7 juillet à Alicante (Espagne).

Prix : 70 euros + affranchissement en recommandé.

ISBN 2.9502432.5.8

En raison du congrès et des congés annuels, les commandes et souscriptions ne pourront être honorées qu'après les vacances. Des informations complémentaires peuvent être reçues de: SAT, 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris.

<[satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)>

<<http://www.sat-esperanto.org/>>

fonto: Gazetaraj Komunikoj de SAT-amikaro

*Was lange währt, wird endlich gut:*

## *Die neue Ausgabe des "Plena Ilustrita Vortaro"*

Das neue „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto“ (PIV), Format 150 x 255 mm, 1265 Seiten, dessen erste Ausgabe 1971 erschien, gehört mit dem Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Prof. Dr. Erich-Dieter Krause (1999 Buske-Verlag Hamburg) zu den umfangreichsten lexikografischen Werken in Esperanto.

Die von einer Gruppe unter Leitung von Michel Duc-Goninaz völlig neu überarbeitete Ausgabe wird während des SAT-Kongresses vom 1. bis 7. Juli in Alicante (Spanien) vorgestellt.



Foto: Joost Witteveen

Das „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto“ ist, wie viele andere Werke auch, ein Beweis für die Ausdrucksvielfalt des Esperanto.

Es untermauert somit die vom damaligen Bundespräsidenten, Dr. von Weizsäcker, (s. Seite 9) getroffenen Feststellungen. *Red.*

ISBN 2.9502432.5.8

Preis: 70 Euro (zuzügl. Versand)

Erhältlich bei SAT, 67 avenue Gambetta, F-75020 Paris, beim Buchversand der Esperanto-Weltorganisation UEA oder in jeder Buchhandlung.

Achtung: Auslieferung erst nach den französischen Sommerferien



# Euroscola-en-Esperanto

La aprila Euroscola-tago:

Entuziasmigaĵoj, bedaŭrindaĵoj kaj propraj rekomendoj

## 1- Entuziasmigaĵoj.

a) Estas tre bone, ke ĉiujare la diversaj Esperanto-grupoj povis loĝi en la sama gastejo en Strasburgo, nome en CREPS. Tio ja ebligis pli bonan kaj interesan interdiskuton inter la grupoj. Komuna gastejo estas necesa por nia laboro. Iuj proponas veran komunan, turisman kaj distran kromprogramon. Tio estus ideala, sed ankaŭ signifus ja pli longdaŭran restadon kaj tiel estus ekster la Euroscola-aranĝo.



b) Matene estis varma memprezento de nia delegacio, kiu vekis entuziasmigon de multaj junuloj ne-esperantistaj, kaj dum la tagmanĝo pluraj de ili scivole informiĝis pri la lingvo.

Tio estas konsiderinda fakto pri bona akceptado de Esperanto kaj ties junuloj flanke la junularo.

[red.: gratulon por la sukceso !]

## 2- Bedaŭrindaĵoj.

Nia delegacio dividiĝis en kvin labor-grupojn por trakti po unu temon. La junuloj mem elektis sian grupon. Bone sed estas bedaŭrinde, ke finfine ne ĉiuj grupoj kapablis taŭge kunkomuniki ene de la komisionoj dum la Euroscola-tago, kaj sekve ne povis influ la redaktadon de la komisiona rezolucio...

## 3- Rekomendoj de Xavier Dewidehem por la eventuale venontaj Euroscola-tagoj.

a) Estu en ĉiu laborgrupo almenaŭ unu juna esperantisto, kiu sufiĉe bone regas (krom Esperanto) laborlingvon; \*nur poste\* la ceteraj esperantistoj povu elekti sian komisionon (atente al la trafeco de tiu aŭ tiu ĉi temo).

b) Krome ŝajnas preferinde, ke por venontaj Euroscola-tagoj estu malplej da kromaj junuloj (KJ). Ili ja ne povas partopreni la tagon, nur ĉeesti la du plenkunsidojn: ne estas por ili tiel entuziasmige kaj tio postulas duoblan atenton flanke de la AA, por la KJ multe pli ol por la JP.

c) Fine, esperante reokazigon de Euroscola-en-Esperanto en la venontaj jaroj, ni de nun strebu, propagandu por partopreno de novaj grupoj el la tuta Eŭropo.

Tamen, oni konscienu ne tro hasti en sia partopreno:

Euroscola-en-Esperanto celas partoprenon de tuteŭropaj junuloj, kies uzata komuna lingvo estas Esperanto.

Sed ofte ili lernis la lingvon nur de kelkaj monatoj kaj praktike ne kapablas komuniki kun aliaj esperantistaj junuloj

... escepte krokodilante...

Povi konatiĝi, interparoli en Esperanto kun samaĝaj alilandanoj dum la enstrasburga restado estas por la junuloj mem vera elmonro de la praktikaj eblecoj de Esperanto. Tre grava en Euroscola estas paroli pri lingva situacio kaj \*pri\* (ne \*nepre en\*) Esperanto.

Euroscola-en-Esperanto estas laboro ne unu-taga, sed unujara. Unu jaro por organizi la tago(j)n kun la parlamentaj oficistoj, aranĝi listojn kaj detalojn kun la profesoroj...

Sed ankaŭ almenaŭ unu jaro por fruktodona lernado de la lingvo (kaj ties ideoj !) flanke de la junuloj...

Mi deziras elkore danki ĉiujn partoprenintojn, kaj la junulojn kaj la grupresponsulojn, pro ilia laboro kaj partopreno - same mi kore dankas al nia amiko Gilbert STAMMBACH pro siaj gravaj, senĉ esaj streboj.

*Xavier Dewidehem*

Kunorganizinto de E-Euroscola 2002,  
Responsulo pri la retejo E-Euroscola.

<http://e.euroscola.free.fr>

Herausgeber	Éditeur	Eldonisto	Saarländischer Esperanto-Bund e. V. (Union Sarroise pour l'Espéranto) (Sarlanda Esperanto-Ligo r.a.) PF 1844, D-66468 Zweibrücken <a href="http://www.esperanto-info.net">www.esperanto-info.net</a>
Verantw. Redakteur	Rédacteur responsable	Respondeca redaktoro	Peter Hauser PF 401243, D-63277 Dreieich <a href="mailto:Ercmontara.EC@t-online.de">Ercmontara.EC@t-online.de</a>

\*\*\*\*\*

Manuskripte senden Sie bitte möglichst per elektronischer Post als Inhalt der Nachricht (bitte keine Dateianhänge).  
Bildmaterial senden Sie bitte nach Absprache.  
Für unaufgefordert eingesandtes Material wird keine Rücksendung garantiert.  
Einsender erklären sich mit einer redaktionellen Bearbeitung einverstanden (keine Übersetzung), wenn dem nicht ausdrücklich widersprochen wird.

©  
Alle Rechte an Manuskripten, Bildern, Zeichen, u.a. bleiben dem Herausgeber oder anderen Inhabern vorbehalten. Nachdruck, auch auszugsweise, ist ohne Genehmigung des Herausgebers verboten.  
Anfragen zur Weiterverwendung von Material dieser Zeitschrift müssen sich auf konkrete Dokumente beziehen. Eine pauschale Genehmigung wäre unwirksam, selbst wenn sie erteilt würde.  
Dokumente des Presse- und Informationsamtes der Bundesregierung können auf der Seite [www.bundesregierung.de](http://www.bundesregierung.de) (in deutscher Sprache) eingesehen und ggf. zu den dort veröffentlichten Bedingungen bezogen werden, nicht jedoch aus dieser Zeitschrift.

\*\*\*\*\*



Manuskriptojn bv. laŭeble sendi per retroŝto kiel enhavo de la informo (bv. ne aldonu datumarojn).  
Bildmaterialon bv. sendi laŭ interkonsento.  
Ĉe nepetita materialo ni ne povas garantii la resendadon.  
Sendintoj deklaras sian permeson de redakcia prilaborado (nenia tradukado), se ili ne rekte mencias kontraŭon.

Nous vous prions d'envoyer vos manuscrits par courrier électronique comme contenu de l'information (veuillez ne pas joindre de fichier attachés, s.v.p.).  
Prière de n'envoyer du matériel iconographique qu'après consentement préalable.  
Aucun renvoi n'est garanti pour du matériel envoyé sans que nous vous en ayons prié.  
Les expéditeurs se déclarent d'accord avec une version rédigée (pas de traduction), lorsqu'ils ne la contredisent pas de manière explicite..

©  
Tous droits d'auteurs de manuscrits, d'images, de signes et autres sont réservés à l'éditeur et aux autres détenteurs. La reproduction, même partielle, est interdite sans l'autorisation de l'éditeur. Des demandes effectuées afin de pouvoir réutiliser le matériel contenu dans ce magazine doivent se référer à des documents concrets. Une autorisation globale de reproduction serait sans effet, même si elle était concédée. Les documents de l'Office de Presse et d'Information du Gouvernement Fédéral Allemand peuvent être consultés sur le site [www.bundesregierung.de](http://www.bundesregierung.de) (en langue allemande) et, le cas échéant, être extraits sous les conditions qui y sont publiées, mais ne peuvent pas être extraits de ce magazine.

©  
Ĉiuj rajtoj pri manuskriptoj, bildoj, signoj, k.a. estas rezervitaj ĉe la eldonisto aŭ ceteraj posedantoj. Represado, ankaŭ parte, estas malpermesita sen interkonsento kun la eldonisto. Petoj tiurilate devas menciigi konkretan dokumenton. Totala permeso pri represado estus malvalida, eĉ se ĝi estus donita. Dokumentoj de la Ĵurnalista kaj Informa Oficejo de la Federacia Registaro de Germanio estas videblaj sur la (germanlingva) retpaĝo [www.bundesregierung.de](http://www.bundesregierung.de) kaj laŭ la tie publikigitaj kondiĉoj eventuale riceveblaj kaj uzeblaj. Al negermanlingvanoj la redakcio pretas helpi laŭ la disponeblaj eblecoj.  
Deprenado el tiu ĉi ĵurnalo estas malpermesita.